Diversaj informoj pri Ernesto Guerra

Album https://flickr.com/photos/22366608@N00/albums/72157718603527988

Album description (7/2021)

En la poŝtkartokolekto de la Esperanto-Fondaĵo Cesar Vanbiervliet estas deko da poŝtkartoj senditaj al Ernesto E. Guerra, poŝtestro, en Tampico kaj aliaj lokoj en Meksiko, inter la jaroj 1916 kaj 1961. La kartoj estis senditaj interŝanĝe kaj ne enhavas multajn personajn informojn.

Ernesto Guerra (ankaŭ foje 'de Guerra') estis en Belgio en 1927 kaj en kelkaj lokoj prelegis (laŭ revuo Belga Esperantisto 153 kaj 154, novembro kaj decembro 1927). Eblas ke li estis malrekte ligita al la kreo de Esperantogrupo La Konkordo en belga urbo Kortrijk en 1927 pro rilato kun Celina Guerra kaj Frans Vandommele (1900-1987).

Li estis veterano de la meksika revolucio de 1910 (eo.wikipedia.org/wiki/Meksika_revolucio) kaj pro tio li foje estas menciita kiel generalo. Li edziĝis kun francino Mathilde Jaquel (Franca Esperantisto 1921, p. 134), poste kun italino Mirza Marchesi (eo.wikipedia.org/wiki/Mirza_Marchesi), kaj en la 1950aj jaroj kun la kortrijkanino Celina (Celine, Lina) Vandommele. Laŭ letero de Celina al familio Debrouwere, li mortis je 1.2.1963 por korproblemo (mortoloko ne menciita). Laŭ letero de bona konato, d-ro Zinovij Korn al Ukranio, al Debrouwere, Celine en 1969 ankoraŭ vivis en Belgio. [Ĉi tiu teksto estas reverkota kaj kompletigota pro meze de 2021 nove ricevitaj informoj, nun pristudataj]

Hungara Esperantisto sept.-okt. 1930



Atemaxas Guadalajara. (Meksiko). Sro. Ernesto E. Guerra kun larĝanimaj esperantistoj, kiuj interesiĝas pri la grandaj kaj malgrandaj aferoj de la vivo.

Heroldo de Esperanto 15.6.1928



S-ro Ernesto E. Guerra, Tampico, Mexico. Leteroj de larĝspiritaj kaj seriozaj samideanoj celantaj amikecon en ĝia plej ideala senco, estus bonvenataj kaj kavalire korespondataj. Kolektantoj de aĵoj kaj „tempmankuloj" ŝparu siajn PM. (30

Franca Esperantisto aprilo 1920



Mexique. — Malgré la situation troublée, il est quelques adeptes fervents qui n'oublient pas leurs devoirs de propagandistes, notamment M. Ernesto E. Guerra, de la *Vera-Cruz*, qui a publié dans le « Dictamen » de cette ville un excellent article sur l'« Utilisation de l'Esperanto dans le Commerce », un sujet *dans l'air*, comme on le voit ! Les groupes de *Guadalajara* et de *Mexico* se réunissent et ont organisé des cours.

Jarlibro UEA 1921



Atemaxac (Meksikio, Jal.).
D: ERNESTO E. GUERRA.

Jarlibro UEA 1930



Tampico (Tamaulipas). 80 000. — Grava petrolindustrio.
D: Ernesto E. Guerra, poŝtestro.